# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 696.613.958
esperantobilbao@terra.com

**Jar-kotizoj**: Normala: 17 €. Speciala: 14 €. Familia: 30 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

## SEPTEMBRO/OKTOBRO 2003



Prezentado de la eŭropa kongreso dum la Universala Kongreso en Gotemburgo (Svedio), far de la Prezidanto de la E-Grupo de Bilbao.

# ĜENERALA KUNVENO

La **vendredon 12an de Septembro**, je la 19,30 h., okazos, en nia sidejo, ĝenerala eksterordinara kunveno laŭ la ĉi suba tagordo:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokolo de la antŭa ĝenerala kunveno.

2. Organizado de elementa E-kurso.

3. Kristnaska loterio.

4. Venontjara eŭropa kongreso.
   4.1. Informoj diversaj: propagando dum la hispana kaj universala kongresoj, demarŝoj ĝis nun plenumitaj, aliĝintoj, ...
   4.2. Definitiva nomumado de la L.K.K.
   4.3. Farendaj taskoj.

5. Demandoj kaj sugestoj.

La venontan jaron atendas nin la organizado de eŭropa kongreso en Bilbao. Tiel, oni ne bezonas substreki la gravecon de tiu ĉi kunveno. Certe vi ĉiuj povas helpi iamaniere. Ni atendas vian ĉeeston.

## ALVENO DE LA VORTAROJ DE FERNANDO DE DIEGO.

La ĉefverko "Diccionario Español-Esperanto" troviĝas jam en la grupejo. Ĝi estis prezentata dum la hispana kongreso en Valencio far de Miguel Gutiérrez Adúriz. Nia grupo mendis 15 ekzemplerojn, el kiuj 13 estas por tiuj, kiuj ĝin antaŭmendis, 1 restos por la Grupo mem kaj nur 1 restos por esti vendota.

Do, tiuj kiuj antaŭmendis la libron povas jam preni ĝin pere de la responsulo de nia biblioteko, Iñaki Vélez.

## PAGO DE JARKOTIZOJ 2003 / *PAGO DE CUOTAS 2003.*

Se troviĝus ruĝa kruco maldekstre de tiu paragrafo, tio signifus ke vi ankoraŭ ne pagis vian jarkotizon por la jaro 2003. Se tiel estus, bonvolu, kiel eble plej rapide, enkontigi ĝin. Ege dankon. Kotizoj kaj konto troviĝas en la 1a paĝo.

*Si encuentras una cruz roja a la izquierda de estas líneas es porque aún no has pagado la cuota de socio correspondiente al año 2003. Si así fuera, por el buen funcionamiento del Grupo, te rogamos que lo hagas cuanto antes. Muchas gracias.* Cuotas y cuenta en la BBK están escritas en la primera página.

# EŬROPA KONGRESO EN BILBAO (aŭgusto 2004).

- Ne forgesu ke la 15an de septembro finiĝas la unua aliĝperiodo, dum kiu eblas profiti la plej malmultekostajn kotizojn. Do, rapide aliĝu aŭ, kontraŭe, vi devos elspezi iom pli da mono. Kune kun la antaŭa "Nia Ponto" vi ricevis aliĝilon; pliaj troviĝas en nia sidejo.

- Ĝis la 31a de aŭgusto aliĝis al la kongreso 15 homoj, el kiuj nur 3 loĝas en Bilbao kaj 7 estas eksterlandanoj (3 el Rusio, 2 el Britio, 1 el Bulgario kaj 1 el Hungario).

- Dum la hispana (Valencio, 15-20 julio) kaj universala (Gotemburgo (Svedio), 26 julio – 2 aŭgusto) estis prezentata la kongreso de Bilbao. Samtempe, dum la UK, bilbaoanoj ĉeestis la kunvenon de Eŭropa E-Unio (EEU) kaj havis la okazon interparoli kun la ĉefaj respondeculoj de tiu organizo pri diversaj aspektoj de la kongresprogramo.

- Ne forgesu ke vi trovos informojn pri la kongreso en la jena TTT-ejo:

http://www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

- Kaj ne forgesu la ret-adreson de la kongreso: esperantobilbao@terra.com

## SOMERAJ KONGRESOJ.

- Tri bilbaoanoj (Eduardo Larrouy, Teodoro Ibáñez kaj J. Miguel García) partoprenis la hispanan kongreson en Valencio. Ili aktive propagandis la venontjaran kongreson, partoprenis la HEF-kunvenon, la kunvenon de grupaj delegitoj kun la estraro, la SATEH kunvenon, ...

- Du bilbaoanoj (Eduardo Larrouy kaj J. Miguel García) flugis al Svedio por partopreni la Universalan Kongreson en Gotemburgo, trankvila kaj bela urbo, kiu situas sur la okcidenta sveda marbordo, sufiĉe norde por ricevi la influon de la "noktomeza suno". La nomo Bilbao sufiĉe aŭdiĝis dum la kongreso danke al propaganda budo starigita por propagandi la kongreson kaj al la afiŝoj metitaj diversloke ene de la kongresejo. Aliaj hispanoj kaj ankaŭ eksterlandaj geamikoj helpis en la informaj taskoj dejorante ĉe la budo.

***¡NO LO OLVIDES!*** *El* ***viernes 12 de Septiembre, a las 19,30 h.****, tendremos una reunión en el Grupo para poner nuevamente en marcha nuestras actividades tras el paso del verano. A la tradicional organización de nuevos cursos y compra de la lotería de Navidad, se une, este año, la organización del congreso europeo. En la página anterior tienes el orden del día de la reunión.* ***Contamos con tu asistencia****.*

# LA ĴUS PASINTA SOMERO PER FOTOJ














HISPANA KONGRESO. VALENCIO, 15/20 jul. 2003